

# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

dimanĉon, la 9-an de Julio, 2017 • numero ses

## Hodiaŭ

- ★ **7:15 atm:** Matenmanĝo
- ★ **8:30 – 12:15 ptm:** Lecionoj
- ★ **12:30 ptm:** Tagmanĝo
- ★ **Diversaj horoj: KTF laborsesioj –** Bonvolu aranĝi kun Derek pri la sonregistrado
- ★ **2:00 – 3:00 ptm:** Ni havos du eblojn:
  - Makis prelegos pri **“Dajsvaro: Kial bonaj pasvortoj gravas kaj kiel krei ilin”** en *Flowe 110*
  - Kathryn PRENTICE instruos kiel krei **“leion” per viaj fingroj**, kaj disponigos ŝablonon por triki ĉapelon kun verda stelo. Serĉu ŝin en unu el la klasĉambroj en *Flowe*
- ★ **3:15:** Hanso BECKLIN prelegos pri **“Tri aktualaj poemoj el *Fajro sur mia lango*”**, poemaro de Edwin de KOCK  
*Flowe 110*
- ★ **5:30 ptm:** Vespermanĝo
- ★ **7:00 – 8:00 ptm:** Ray REDD prelegos pri **“Sovaĝaj kaj Malplaĉaj Plantoj: Esploroj ĉe Vojflankoj kaj Aliaj Lokoj”**  
*Flowe 110*
- ★ **7:00 – iam ptm: KTF muzikaj provludoj –** ekde hodiaŭ Alena estos en la teatro (*Main, 2a etaĝo*) ĉiun vesperon. Ŝi disponeblas por provludigi la muzikistojn.



## Vilaĝoj Camphill: Komunumoj de kapablo kaj fiereco

de Warren Hunt

Proksimume 2.5 milionoj da homoj, aŭ unu procentaĵo de la usona loĝantaro suferas handikapojn de kreskado kaj maturiĝo. Tiu malavantaĝo preventas ke la infanoj kun tiaj handikapoj estas edukitaj samklase kun infanoj kiuj ne havas tiajn handikapojn. Sekve, kiel plenkreskuloj ili ne kapablas okupi la kutimajn laborpostenojn kaj devas loĝi aŭ hejme aŭ institucie.

Jam ekde 1961 ekzistas mirinda komunumo en kamapara Nov-Jorkio. Ĝi nomiĝas *Camphill Village USA* (“Vilaĝo Camphill”). Ĉi tiu vilaĝo konsistas el sepcent akroj kaj situas malsupre de la pitoreskaj montetoj Birkshires ĉirkaŭ Copake, Nov-Jorkio, proksima al la rivervalo Hudson.

Ĉe tiu bela loko loĝas cent dudek handikapuloj, konataj kiel “vilaĝanoj,” kaj ankaŭ cent kontrolhelpantoj. Oni nomas tiujn virojn kaj virinojn “kunlaborantoj.” Tiuj volontuloj ne estas pagitaj por sia laboro; anstataŭe ili ricevas stipendion, ĉambron kaj manĝojn, kaj transportadon. Samkiel al la vilaĝanoj, oni provizas al ili la necesajn vivrimedojn.

En la dudek du domoj ĉe Vilaĝo Camphill loĝas normale po ses vilaĝanoj: tri viroj kaj tri virinoj; ankaŭ loĝas en ĉiu domo kontrola familio kun propraj infanoj (kiuj ĉeestas la lokajn lernejojn), kaj kunlaborantoj (unu vira kaj unu virina), kiuj helpas la vilaĝanojn pri persona higieno kaj aliaj bezonoj. La loĝantoj de la domoj vivas kiel grandaj familioj. Ili kune manĝas ĉe granda tablo, kaj kune faras ĉiutagajn taskojn.

Ĉiu vilaĝano havas propran laboron, kiu rekte kontribuas al la vivo de la vilaĝo; ekzemple planti kaj rikolti la legomojn; melki kaj paŝti la bovinojn, baki panon, haki lignon, rikolti aceran sukon por siropo, k.t.p. Ĉiu posteno estas asignita laŭ la taŭgeco por ĉiu individua vilaĝano, kaj povas ŝanĝiĝi laŭ la evoluado de la vilaĝano.



Vilaĝo Camphill ankaŭ starigas slojdajn atelierojn, kiel bakejo, semovendejo, fromaĝfarejo kaj kandelfarejo. Per vendado de tiuj produktoj, la komunumo gajnas monon por pagi siajn elspezojn. Sed tio ne sufiĉas por subteni tian grandan organizaĵon. Ĝi ankaŭ fidis al donacoj de la gepatroj, kies gefiloj loĝas ĉe la vilaĝo.

La vilaĝo ĉe Copake ne estas la sola Camphill-vilaĝo en la mondo. Estas pli ol cent Camphill-komunumoj en diversaj landoj. La Camphill-movado baziĝas sur la antropozofiaj principoj de la aŭstria filozofo Rudolf Steiner. Steiner kredis, ke interne de la damaĝita kaj malfunkcianta korpo de ĉi handikapulo vivas spirite inteligenta homo, kiu havas la samajn bezonojn kaj dezirojn kiel "normalaj" homoj. Ili ankaŭ volas kontribui ion gravan al la mondo, per kio ili strebas esti noblaj kaj fieraj.

Warren Hunt kaj lia edzino Marsha estas la gepatroj de Ellen Marie Hunt, kiu jam estas vilaĝano ĉe la Vilaĝo Camphill ĉe Copake ekde decembro 2004. Ellen melkas kaj paŝtas la bovinojn kaj laboras en la kandelfarejo.

## Tri ŝercoj

*elektitaj de Steve Eichblatt*  
el Step by Step in Esperanto  
de Montagu C. BUTLER

"Kial la kuracisto portas kaŭĉukajn gantojn?"  
"Por povi lavi la manojn, ne malsekigante ilin."

Pastro anoncis, ke la proksiman dimanĉon li predikos pri "mensoguloj"; kaj petis, ke intertempe la aŭdintoj tralegu la dek sepan ĉapitron de Marko. En la posta dimanĉo li petis, ke la legintoj levu la manon. Tuj leviĝis dudek manoj. "Vi estas ĝuste la personoj, kiujn mi deziras alparoli" li diris. "Ne ekzistas dek sepa ĉapitro de Marko."

Oni pentris la nomon de hotelo jene: LA PORKOKAJFAJFILO. Kiam la hotelestro vidis tiun longan vorton, li diris kolere "Tio ne taŭgas. Devus esti spaco inter porko kaj kaj kaj kaj kaj fajfilo."



## Vortenigmo

de Makis

Jen enigmo el la venonta libro: *Vortenigmoj: Angle*. Makis havas kelkajn ekzemplerojn de sia unua libro *Vortenigmoj: Bazvortprovizo*. Ili estas senpage haveblaj. Legu pli ĉe [www.makisdiras.com](http://www.makisdiras.com)

K	U	Ĝ	L	B	G	T	N	E	I	S	O	B	I	I
K	N	T	K	E	G	C	P	N	T	T	O	N	F	I
I	C	F	B	R	B	C	S	S	O	Ĥ	S	U	I	C
A	N	U	K	N	M	O	I	R	L	S	N	S	I	E
N	O	N	T	M	M	U	E	P	E	E	I	I	K	N
E	F	K	S	E	T	M	B	E	O	U	N	K	E	O
F	S	C	O	C	N	R	S	D	E	S	E	L	I	E
S	C	I	G	N	I	Ŝ	C	E	C	S	Ĝ	O	C	N
Ĥ	E	R	U	F	K	U	M	N	M	E	R	P	M	R
F	E	I	I	E	T	O	R	E	N	T	P	A	S	Ĥ
V	N	N	I	N	O	M	R	A	H	I	Ĝ	S	N	K
E	L	O	E	O	O	B	V	D	E	O	I	E	V	P
N	O	R	L	M	K	N	F	E	Ŝ	K	R	I	Ŝ	P
K	U	I	T	E	B	A	F	L	A	K	P	S	I	I
K	P	O	R	N	M	M	S	M	E	R	T	K	N	H

**ALFABET'**  
alphabet

**AV'**  
grandfather

**BREMS'**  
brake, break key

**CIGN'**  
swan

**EĤ'**  
echo

**FENOMEN'**  
phenomenon

**FUNKCI'**  
function, capability

**HARMONI'**  
harmony

**IRONI'**  
irony

**KAS'**  
cash box, money box, till

**KONKORD'**  
accord, harmony, agreement

**KURENT'**  
current (electric), power (energy)

**LIP'**  
lip

**MELON'**  
melon

**NEĜ'**  
snow

**SCIUR'**  
squirrel

**SPEC'**  
kind, sort, form, species

**ŜU'**  
shoe

**TORENT'**  
stream, torrent, volley

**VERG'**  
cane, rod, switch, wand, stick

## Enigmo

de Zerbie HYNSON

Se mi supersaltas la akvofalojn de Niagara sur motorciklo, kaj defalas ĝiaj pordoj, kiom da krespoj necesas por plenŝtopi hundodometon? Ĉu jes, ĉu ne?

(La "solvo" aperos morgaŭ - Redaktoro)